

Sieber kaj Hotelo Zum Pass

La vilaĝo **Sieber** situas 340 metrojn super marnivelo en la valo de samnoma rivero en la sudo de la mezalta montaro Harz en Malsupra Saksio, federacia lando de Germanio. La vilaĝo estas parto de la urbo Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo. Sur areo de 114 hektaroj loĝas 749 enloĝantoj (2011).



Sieber, same kiel la vilaĝo Lonau, originas de setlejo, kiu evoluis komence de la 16a jarcento pro la fondo de ferminejoj kaj ferproduktejoj.

En la jaro 1574 oni mencias por Sieber tri fandejojn, nome la Königshofhütte (reĝkorta fandejo), la Sieberhütte (Sieber-fandejo) kaj la Untere Sieberhütte (malsupra Sieber-fandejo).

Unu el la vizitindaj lokoj de la ĉirkaŭaĵo estas Hanskühnenburg, alia la monto "Großer Knollen" (Granda bulbo). La tiea turo ofertas panoraman rigardon al arbokovritaj montoj kaj valoj kaj al setlejoj en la antaŭmontara ebenaĵo. La restoracieto sur Großer Knollen havas esperantlingvan menukarton.



La vilaĝa blazono montras S-forman arĝentan linion sur verda fono, supre de tio estas ora cervokornaro kaj sube estas krucigitaj oraj minejmarteloj. La S-forma linio simbolas la arĝentkoloran rivereton Sieber, kiu trafluas la verdajn herbejojn kaj arbarojn. La minejmarteloj indikas la originon de Sieber kiel unu el la plej malnovaj minejvilaĝoj en la Harz-montaro, kaj la cervokornaro estas simbolo por forstado.

Nuntempe la ŝatata migradvojo „Südharzer Baudenstieg“ (Sudharca Kabanitiner) kondukas preter la „Hotelo zum Pass“.

Hotel zum Pass (Hotelo Limpasejo)

Jam en la jaro 1780 oni menciis tiun ĉi tradician hotelon en dokumentoj. Ĝi ricevis la nomon laŭ iu paseja strato, kiu situis inter Bad Lauterberg kaj Sieber. Sieber kaj tiu ĉi gastejo troviĝis senpere ĉe la „trilanda angulo“ inter la limoj de la teritorioj Duklando Braunschweig, Reĝlando Hannover kaj Grafejo Bad Lauterberg.

En la tiel nomata „bona malnova tempo“ oni ja ankoraŭ transportis la monhavajn vojaĝantojn per ĉevalĉaroj. Al „Pasejo“ (Hotel zum Pass) oni eniris por restoracia restado, tranoktado kaj ŝanĝado de la ĉevaloj. Krome oni interŝanĝis poŝtaĵojn laŭ la transportceloj. Certe ĉi tie oni ankaŭ stampis la pasportojn de la „preterpasantaj vojaĝantoj“.



La hotelposedantoj ofertis ankaŭ glacikelon. Dum la plej multaj jaroj de decembro ĝis septembro ili disponis pri sufiĉe da glacio. Dumvintre oni segis la glacieron en la Jues-lago de la proksima urbeto Herzberg.

La aerkuracloko Sieber en la belega Sieber-valo jam je la fino de la 18a jarcento estis ŝatata ripozloko por la elegantaj ferioĝastoj el la grandurboj.

En la 20a jarcento dum sesdek jaroj tiu ĉi fama hotelo estis la komuna posedaĵo de la familioj Koch kaj Chévalier. Somere 2011 la esperantista familio Liberski el Pollando aĉetis la 3-stelan hotelon Zum Pass, kie ili funkciigas ankaŭ kafejon kaj restoracion. Esperantlingva menukarto estas havebla!

En la hotelkonstruaĵo ekzistas eĉ malnovtipa vinkelo. La romantika bierĝardeno ĉe la riverbordo de Sieber apartenas al la plej belaj en la Harz-regiono. La balsalono taŭgas por elstaraj festenoj, koncertoj, dancado.

Tie oni povas ofte ĝui la kantojn, jodlo-prezentadojn, muzikon de la orkestro Die Siebertaler (la Sieber-valanoj), kiu flegas la lokajn tradiciojn, portas folkloran vestaĵon, kantas pri la regiono, legendoj, minado, arbaro, bela naturo.

